Pro plialtigo de poŝt-tarifo kaj abono al LA INFORMILO:

= kotizo kun libro "M^o11" + pedagogiaj slipoj: 165 F... plus eventuale la kasedo: 55F do entute 220 F.

J.-P. COLNOT

LIBERA TRIBUNO

Okaze de nia Federacia Kongreso en MONTIGNY-lès-METZ ni oficiale starigis demandon /transdonita al UFE/ pri la "eventoj" sine de PEA (Pola Esperanto-Asocio) kaj pri la eventualajsekvoj, kiuj povus certagrade influi sur la normala disvolviĝo de la planita 72a UNIVERSALA KONGRESO en VARSOVIO en 1987, por la Jubilea Jaro de E°

Ni taksas oportune disponigi al niaj legantoj kelkajn tekstojn, kiujn ni ĉerpis el ĵus aperinta bulteno (N° 5) de GEJ (Germana Esperanto-Junularo). Ankaŭ la magazino "MONATO" publikigis (N°4-1986) interesindan leteron de iu legantino, kiu povus kompletigi provizore la malfermitan dosieron...

72A
UNIVERSALA
ESPERANTO-KONGRESO
DE U.E.A.
VARSOVIO 1987



Pola Esperanto-Asocio Varsovio, 1986/05/19
PL-00-013 Warszawa, ul. Jasna 6
tel. 27-97-42

AL LANDAJ ESPERANTO-ASOCIOJ
AL ESPERANTO-GAZETARO

Estimataj!


Lige kun la letero de SAT sendita al la E-gazetaro (1986/03/26), kiu atingis nin en la fino de aprilo, ni estas devigitaj prezenti kelkajn faktojn kaj nian starpunkton, kion ni faras kun sincera bedaŭro, ĉar ni esperis, ke SAT-Gvidantaro komprenas siajn mispaŝojn. La tekston vi trovos ĉi kune.

Samtempe ni uzas la okazon por informi vin, ke la preparlaboroj al la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en 1987 bone evoluas kaj post la lasta (en majo) vizito en nia ĉefurbo de la ĝenerala direktoro de UEA, s-ro Simo Milojević, ankoraŭ pli vigliĝis. Laboras nova LKK, kies prezidanto estas elstara pola esperantisto, s-ano Stanisław Świstak, en la konsisto de LKK troviĝas kelkaj konataj agantoj

de pola kaj internacia E-movado, kaj sciencistoj kiel doc. d-ro Marian Dobrzyński, d-rino Elżbieta Nawrocka, red. Andrzej Pettyn kaj red. Bolesław Staszczak el RADIO POLONIA, fakuloj pri siaj LKK-funkcioj egz. mag. Elżbieta Wyrwicz (laborantino de la Ĉefa Komitato pri Turismo), Kalina Pieńkiewicz el la Pola Esperanto-Teatro kaj aliaj. Bone evoluas la kunlaboro kun la Pola Kulturministerio, vojaĝoficejo "Orbis" kaj Flugkompanio LOT, kiu eĉ promesis okazigi solenan dum kongresan nomigon de unu el la pasaĝeraj aviadiloj de LOT per la nomo LUDWIK ZAMENHOF, pretiĝas la kongresa kultura programo, ekskursoj, informiloj ktp. Ĉio ĉi esperigas pri bona kongreso kaj tian ni vere dezirus realigi. Baldaŭ aperos la unua kongresa bulteno, sekvos la kongresaj komunikaĵoj.

Kun sinceraj salutoj en la nomo de la gvidantaro de PEA

PREZIDANTO
de la Estraro
de Pola Esperanto-Asocio


/mag. ing. Włodzimierz Wesołowski/

KIAL SAT NE KONGRESOS EN POLLANDO EN 1987?

La Plenum-Komitato de SAT dissendis al la E-gazetaro leteron, datitan 1986/03/26, laŭ kiu oni povas konkludi, ke SAT estas mirigita, ke "PEA ne plu subtenas" la projekton de SAT-kongreso en Pollando en 1987.

Ni rememorigu la faktojn. En 1983 okaze de SAT-kongreso en Linz - Pola Esperanto-Asocio prezentis al SAT la inviton kongresi en Pollando konforme al plejble bonaj intencoj, ĉar en la Jubilea Jaro oni volis kongresigi en Pollando ĉiujn adeptojn de la Internacia Lingvo kaj ĉiujn sincerajn amikojn de la patrujo de Esperanto.

Pasis jaroj, dum kiuj flanke de SAT-gvidantaro venis al PEA eĉ ne plej eta signo de interesiĝo pri la kongresado en Pollando en 1987. Tio ĉi jam povus esti sufiĉa kialo por veni al la konvinko, ke la inviton oni faris tro frue kaj sen konsidero al la veraj emoj kaj interesiĝoj de SAT-gvidantaro. Dume en la organo de SAT "Sennaciulo" pli kaj pli ofte komencis aperi artikoloj misprezentantaj kaj misfamigantaj Pollandon kaj aliajn socialismajn landojn. Cetere tiuj misprezentoj sekvis ne nur en "Sennaciulo" sed ankaŭ en aliaj SAT-eldonaĵoj frontloke kun "Sennacieca Revuo". Misprezentoj, glorigado de kontraŭsocialismaj opoziciaj tendencoj, evidenta enmiksiĝado en la internajn aferojn de Pollando, dubindigado de aliancoj de Pollando kun aliaj socialismaj ŝtatoj - jen mallonge dirite la linio de SAT speguliganta en Esperanta-revuoj de tiu organizo.

Ni rememorigu, ke apenaŭ kelkajn monatojn post la invito de SAT-kongreso al Pollando en "Sennaciulo" oni aperigis kontraŭpollandan artikolon "Ĉu la aglo tute cedos?" (decembro 1983), per kiu oni primokis la strebado de poloj al la pacavoja rearanĝo de la situacio en la propra hejmlando.

Jen la "amika" dankesprimado de SAT pro la invito kongresi en Pollando! Alia ekzemplo de la starpunkto de SAT (oni ne diru, ke oni ne scias, kio aperas en la propra organo!) estis la artikolo "Pri konferenco de Jalto - 40 jaroj", per kiu SAT dubindigas la gravecon de Jalto-decidoj, tiom signifoplenaj por la evoluo de la postmilita paca situacio en Eŭropo. Strange, ke SAT oficiale deklaras sin por paco, sed ne volas rekonii la rolon de la decidoj de Jalto kaj Potsdamo por la firmigo de tiu paco!

Estas klare, ke ne la estraro de PEA, sed SAT mem per siaj unusignifaj paŝoj fermis al si la vojon al Varsovio en la Jubilea Jaro! Tia estas la vero kaj certe bone konscias tion la Plenum-komitato de SAT. Oni ne provu respondecigi pri tio polojn, kiuj ĉiam estis kaj estos gastamaj, sed neniam konsentos akcepti en sia hejmlando dubindajn gastojn. Estas bedaŭrinda afero, ke la gvidantaro de SAT ne eltiris ĝustajn konkludojn el sia historio, ne lernis el la amaraj spertoj de la pasinteco. Domaĝe, ĉar en SAT estas ja ankaŭ valoraj iniciatoj kaj multaj respektindaj agantoj. Restas esperi, ke prudento kaj realecosento denove superregos en SAT kaj tiam venos la tempo, ke SAT ne nur povos kongresi en socialisma lando, sed eble eĉ disvolvi legalan agadon.

GVIDANTARO DE POLA ESPERANTO-ASOCIO


Surpriziĝas kun troigita alta voĉo SENNACIULO (4.), ĉar oni jam ne invitas SAT kongresi venontjare en Pollando. Kial? Mi opinias, ke pro ilia rabia, krude malamika sinteno. Ajna registaro rifuzus inviti la ĝin kalumniantan organizon. Rigarde la E-movadon, mi (bedaŭ-

rinde) certas, ke apud la jubileanta Kongreso de UEA, la minacaj voĉoj de SENNACIULO provokos skandalojn, tro malagrablajn por niaj pola kaj universala movadoj. Tiam situacion volis eviti Pola Esperanto-Asocio, ĝi agis prudente, eĉ favore al la movado, kiu ne estas ludilo de malpacemuloj.

(eltranĉita el "HUNGARA VIVO"...))

Ervin Fenyvesi

**karaj junaj
geamikoj**



Jam de nun
bonvolu noti
tiun eventon
sur vian poŝ-
kalendaron!

Ĉiujn pliajn
praktikajn
informojn
vi ricevos ĉe la
sidejo de via organi-
zo:

J.E.F.O.

4bis, rue de la Cerisaie

75004 PARIS

Pro la jubilea jaro
via specifa Kongreso

havos tutcerte grandan sukceson! Ek de nun
aliĝu... kaj ŝparu!



Unu semajnon antaŭ la 100-jariĝo
de Esperanto komenciĝos la 43-a
Internacia Junulara Kongreso de
Tutmonda Esperantista Junulara
Organizo. Tiu kongreso okazos en
Krakovo (pole: Kraków - pronocu:
Krakuv). Sendube ĝi estos unika
ebleco renkontiĝi kun Esperanta
kaj pola kulturoj.

La kongresurbo

Krakovon fondis - laŭ la legendo - la princo de la gento
Wiŝlanie, Krak aŭ Krakus, kiu loĝis sur la monto Wawel
en la oka jarcento. La unua mencio pri Krakovo datumas
de la jaro 970. Tiam Krakovo jam estis grava centro de
la komerco. Ekde la 11-a jarcento Krakovo estis ĉefurbo
de Pollando por 500 jaroj. La plano de la urbo, imitanta
ŝaktabulon, restis senŝanĝe ĝis hodiaŭ: meze de la urbo
traviĝas grandega kvadrata ĉefplaco, de kiu perpendikle
eliras la stratoj.

En Krakovo troviĝas multaj historiaj vidindaĵoj, arkitek-
turoj mirakloj, famaj preĝejoj, palacoj, kaj ĉefe la reĝa
kastelo sur la monto Wawel - la perlo de la malnova arto
kaj granda monumento de la kulturo.

En la 70-aj jaroj de tiu ĉi jarcento komenciĝis intensaj
renovig-laboroj. La malnova parto de Krakovo troviĝas en
la Unesko-listo de la "Homara heredaĵo".

Nuntempe Krakovo havas okcent-mil enloĝantojn. En la urbo
traviĝas 11 altlernejoj, inter ili "Jagiellona"-Universi-
tato fondita de reĝo Kazimiro la Granda en la jaro 1364,
pluraj teatroj, sed ankaŭ moderna industrio.

Krakovo estas facile atingebla aŭte, trajne, aviadile - kaj
bicikle.

La kongresejo

Ni loĝos en du- kaj tri-litaj ĉambroj en studentaj domoj
de la loĝkomunumo de Minist-Fandēja Akademio. La kongres-
salonoj kaj -manĝejo troviĝas proksime de la loĝloko.

Programo

La temo de la kongreso estas: "Homo kaj civilizaciaj minaco
La kongresanoj detale traktos ĝin en prelegoj, diskutoj kaj
laborgrupoj.

Grava parto de la kongresa programo estos ligita kun la

Krakovo, Pollando



43a internacia junulara kongreso 17-24 julio 1987



jubilea manifestacio. Okazos ankaŭ la kutimaj programeroj:
teatra, internacia, balo, ...

Kadre de la kongressemajno okazos la 5-a seminario de
TEJO kaj PSEK por Esperanto-aktivuloj, dediĉita al esperan-
tologiaj temoj.

La kongresanoj povas elekti inter tri ekskursaj celoj:

- la belega ripozloko Zakopane en la Tatra-montaro
- la muzeo pri la dumilita koncentrejo en Oswiecim (germane: Auschwitz) - pruvo de terura murdado
- la unika malnova salminejo en Wieliczka, kie inter alie troviĝas sala preĝejo kaj kuracejo

Post la IJK vi povas partopreni la 72-an Universalan Kon-
greson en Varsovio, okazonta inter la 25-a de julio kaj la
1-a de aŭgusto 1987.

GRAVA ATENTIGO: la redaktoro de tiu porjunula paĝo ricevis neniun raporton pri okaza-
ĵoj, al kiuj partoprenis multaj el vi...
Ĉu vere vi ne deziras profitigi aliajn E^o-praktikantojn el viaj propraj
spertoj? Nu, kaptu vian skribilon! Ni atendas vian tekston por la n^o56!

ILI PARTOPRENIS !

ĈU NI REVIZITOS LA CHAUX-DE-FONDS?... MEMEVIDENTE!



Estas agrable restadi dum du semajnoj en LA CHAUX de FONDS por resanigo, post vojaĝo tra la francaj kaj svisaj Ĵurasoj.

La KULTURA CENTRO ESPERANTISTA funkcias sub la direktado de Claude GACOND, ties nelacigebla direktoro kaj samtempe: kursgvidanto, animanto de la kulturaj vesperoj, administranto de K.C.E., ekskursgvidanto, helpata de lia edzino.

Funkcias ĝenerale tri kursoj: por komencantoj sub la gvidado de Dr^o Michel FRESSARD, Dr^o pri fonetiko kaj sola salajrulo de KCE, por progresantoj (t.n. paroliga kurso), kaj altnivela kurso. Dum la periodo, kiun ni ĉeestis, gvidis la kursojn Thomas CHMIELIK, Polo, profesoro pri germana lingvo en la Universitato de LUBLIN kaj preparanta esperantlingvan tradukon de la verkaro de la svisa aŭtoro DÜRRENMATT, Georges LAGRANGE, fame konata kiel aktoro en la trupo TESPA (Teatro-ESperanto de PARizo) kaj en la kabaredo "La ruza kruĉo", lertigis nin, poste, en la tradukarto el la

franca literaturo.

Ni malkovris ankaŭ la belajn pejzaĝojn de la Svisa Ĵuraso dank' al du ekskursoj al akvofalo "Le Saut du Doubs" kaj al naturparko "Le Creux-du-Van".

Tiu restado permesis al ni babili kun eksterlandanoj: el Israelo, Italio, Germanio, Nederlando, Brazilo, Alĝerio kaj Kanado.

Ankaŭ Claude GACOND ne timas partopreni la necesajn praktikajn taskojn, kvankam geju nuloj helpas lin: tiel ili ne pagas sian dusemajnan restadon, laborante unu semajnon, vizitante la kursojn la alian. Krom la pura svisa aero, ni ĝuis ankaŭ la tipe svisajn nutraĵojn.

La slogano de KCE : "Studi matene, ferii posttagmeze", estas do vera kaj ni invitas aliajn esperantistojn vojaĝi iam al tiu spaco de paco kaj de interpopola konduto.

Catherine ROUX

RESPONDE AL INVITO DE NIAJ GERMANAJ NAJBAROJ...

Ĉiam fruktodona iĝas partopreno al la KULTURAJ SEMAJN-FINOJ organizataj de la Sarlanda Esperanto-Asocio. La somera rendevuejo situis apud Homburg, en la Kardinal Wendel-Haus, loko tre facile kaj tre rapide atingebla de ĉiuj orientfrancaj loĝantoj.

Tuj post la alveno, forte impresas la komforta aspekto de la stagejo: tre agrablaj dormoĉambroj, bone ekipitaj kursosalonoj, vasta manĝoĉambro... kaj vere alloga verdejo apuda, kiu invitas al kvieta paŝumado inter la kurso-sekvencoj.

Krom la plezuron ree renkonti gekonatulajn el diversaj regionoj oni ĝuas memkompreneble la klerigan atmosferon de la "studhoroj". Ĉi-foje Dr^o ALBAULT, prezidanto de la E^o-Akademio malkovrigis al ni kelkajn kaŝitajn aspektojn de la "fundamentaj" verkoj de Zamenhof / mi aldonu, ke paralele okazis kursoj diversnivelaĵ, propre instrucelaj/

Pri la prelego mem, almenaŭ miaopinie, mi bedaŭris la troan "unudirektan" flankon de la evento; mankis ja dialogoj, diskutoj, reagoj de la "publiko", ĉar tro raraj estis la intervenoj de la "aŭskultantoj" (tiaj ili ja kondukis). Ĉu pro timo fronte al la moŝteco de la Akademi-Prezidanto? Ankaŭ mankis al mi -ĉu tro subjektiva konstato mia?-ia "spica" etoso dum la staĝo... eble ĉar mi estas denaske nekuracebla humurŝatanto! Ĝenerale la staĝanoj mienas certagrade tro "severe"... Malofte aŭdiĝas rideksplodaĵo, vagabondas ŝercrakontoj... Eble tio okazis vespere en la "drinko-ĉambro", kiun mi rezigni ĉeesti pro tro densa tabakfumo.

Kompense, aparte simpatia ja estis la "ceremonio", dum kiu la ĉeestantaro pere de germana specifa skipo gratulis R. Hauptenthal okaze de lia 20-jara E^o-Jubileo. Mi kaptu la okazon por persone ankaŭ gratuli, car la homo ja meritas pli ol la simblan donacon, kiun li ricevis kaj pli ol la humurplenan poezion al li -kaj al la edzino!-dediĉita...

Hej, legantoj! Vidu! Mi do eraris: humuro do estis dum la staĝo! Tutsimple mi apelacias al vi por pliampleksigi la aferon dum la venontaj staĝoj..., kiujn mi tutevidente ĉeestos... Ĉu mi povas kalkuli pri via "paca" kuninvado?

P. DENIS

JES JA!... MI PEKINUMIS!

Post kvarsemajna restado, kion mi rakontu pri tiu giganta lando? Mi ne estas verkisto, do mi nur disĵetos sur la paperon impresojn kaj memoraĵojn miajn kaj eble profitigos la legantojn de "LA INFORMILO".

Dek kvin horoj aviadile ek de Parizo al Pekino ŝajnas esti laciga vojaĝo. Mi konstatas, ke neniam mi havis emon dormi. La aviadilo estis grandega kaj komforta, eĉ promenadoj tra la du larĝaj kaj longaj spacoj laŭlonge de la foteloj estis permesitaj kaj tre uzitaj. Mankis nek manĝo aŭ manĝeto nek diversaj trinkaĵoj; ankaŭ variaj "gaĝetoj" estis disdonitaj de ĉarmaj ĉinaj junulinaj pasageroj.

Dum la flugado, klarigoj pri la landoj su perflugitaj, konsiloj, aŭdiĝis pere de mikrofono, ĉu en ĉina ĉu en angla lingvo... ŝajnas, ke la esperanto-parolantaj homoj ne estis inkluzivitaj.

Ek de la flughaveno ĝis centro de la urbo Pekino ni veturis 30 km^ojn, parte sur larĝa avenuo, kies bela nomo estas "Avenuo de la Eterna Paco". Matenmanĝo okazis survoje en iu restoracio, kie ni konatiĝis kun turnebla tableto, t.e. tableto kuŝanta sur granda ronda tablo. Pli malfrue ni spertis ties agrablecon por manĝi laŭ la ĉina maniero. La ĉina manĝo, kiun ni gustumis dum nia tuta restado, konsistas el almenaŭ dek ses pladoj minimume, malvarmaj, varmaj, pli da kiam temas pri festmanado. Parolante te pri pladoj mi ne aludas niajn tradiciajn pladojn, ĉar estas nur etmanĝaĵo, kiu estas elektita el 300 specioj de variaj aĵoj!

La metodoj por preparado estas diversaj, kiaj vaporumado, fritado, kuirado, bakado, rostado, pastfritado, etĵajra aŭ fortĵajra kuirado, brezado kaj bolkuirado... Dank' al tiu preparado vi manĝas tamen ĉiuspecojn de viandaĵoj, fiŝaĵo, legomo, ovaĵo, ktp.

Neniam oni sentas sin tro sata... sed tute ne malsata. Komprenoble la popola ĉiutaga manĝo ne estas tiom abunda kaj varia sed konsistas nue el kvar pladoj kaj supo kaj rizo. Ĉiu scias, ke rizo ludas grandan rolon en ĉina nutraĵo, rolo pli granda ol ĉe ni la terpomoj. Tamen gvidistino diris al ni, ke ŝi ofte akceptas familianaron aŭ geamikojn dimanĉe kaj ankaŭ ŝi pretigas multnombrajn pladojn por regali la gastojn. Neniam ni vidis forkonajn kaj tranĉilojn... nur du manĝbastonetojn... vole nevole oni estas devigataj instrui al si la manieron, laŭ kiu oni devas uzi ilin! La miraklo efektiviĝas, se oni ne volas morti pro malsato!

PEKINO surprizigas pro la amaso da homoj kaj biciklantoj sed ankaŭ pro la aspekto-trankvila- de ĉi-tiu popolo... neniam batpaso aŭ puŝpelo okazas dum la iro-reirado de tiom multnombraj cirkulantoj... tute ne, sed la fama ĉina rideto verigas!

Dum naŭ sinsekvaj tagoj ni vizitis templojn, grotajn, vendejojn, magazenojn, ni promenadis tra mirindaj ĝardenoj, strangaj pejzaĝoj kiel ekzemple la ŝtona arbaro en LOUNAN. Komprenoble mi ne povas raporti de tale pri ili.

La hoteloj estis ĉiam komfortaj, eĉ luksaj, la servistaroj ĝentilaj kaj aĉablaj.

Mi sopiris pri la ESPERANTO-KONGRESO, ĉar estis ja la celo dezirata de ĉiu samideano. Ankaŭ havi eblecon restadi tutan semajnon en hotelo, kie fine mi sukcesus malplenigi la valizon, ne estus malplaĉinta al mi! O ve!... Surprizo malagraba por ĉiuj: ni ne loĝos en hotelo de la AMJKECO! La alia anoncita hotelo situas 15 km^ojn malproksime de la Kongresejo! Alia elreviĝo: ne okazis la "interkona vespero" pro la multnombraj Esperantistoj, dissemataj, mi opinias. Dum la daŭro de la Kongreso ni dependis ĉiam de speciala aŭtobuso, ĉu por foriro, ĉu por reveno al la hotelo, ankaŭ por ĉeesti la diversajn spektaklojn, ekskursojn, kune kun la partoprenantoj de la "franca karavano"... Tio malobligis fakte renkontiĝon kun eksterlandanoj sed kunigis multajn "krokodilojn"!

Memkomprenoble, tiuj, kiuj ne estis komitatanoj aŭ ne havis devon aŭ nur emon partopreni iun ajn paroladon, preferis turisman flankon.

Tuj post la fermo de la Kongreso okazis la 4a duontaga ekskurso kaj la postan tagon forveturado (forflugo) el Pekino, kune kun la homoj de la "dua karavano".

Dum la dek sekvantaj tagoj ni vizitis ankoraŭ neforgeseblajn vidindaĵojn de antikva Ĉinio, modernajn lokojn de la nuna Ĉinio kaj malnovajn urbetojn, vilaĝetojn...

La pekina meti-artaĵoj ne estis forgesitaj dum niaj vizitoj, temas pri jadskulptaĵoj, klozoneaĵoj kaj gravuritaj lakaĵoj, skulptaĵoj de eburo. Alia loko por elspezi monon estas vidado de fabriko de teksaĵo, precipe de silko, vizito al laborejo kaj magazeno de pentro-arto sursilka.

Post la forlaso de Pekino, famaj kaj grandaj urboj estis enŝovitaj en la ekskurso-programo: XIAN - DAZU - SHANGAI - GUILIN - CANTON... fine HONG-KONG.

Tiujn urbojn oni atingis ĉu fluge, ĉu trajne, ĉu ŝipe. La ŝipado entuziasmiĝis ĉiujn kaj ĝi restos en nia memoro kiel la plej memorinda. La pejzaĝo estas unika. Nun, tagon de kompleta ripozo...

Speciale menciindaj devas esti la ekskurso al la tombejo de la imperiestro QIN SHI HUAN DI, loko en kiu oni elfosis 6000 soldatojn, ĉevalojn kaj ĉarojn, skulptitaj el argilo... kaj la grimpad-ekskurso sub arda sunbrilo de parteto de la "Granda Muro"...

Ni ne forgesu, ke ekzistas tamen esperantistoj en Ĉinio! Grupeto da ili bonvenigis nin je la alveno ĉe la flughaveno en Kunming kaj vespere venis al nia hotelo por babili iomete. Dua grupo vizitis nin en alia urbo kaj ankaŭ venis vespere al nia hotelo. Bonŝanca mi ja ne estis: mi havis voĉ-perdon dum du tagoj kaj precize tiun interesan kuniĝon mi ne povis partopreni! Tamen samideano transdonis al mi bildkarton, sur kiu li skribis krom

aĉablajn vortojn, sian adreson en ĉina kaj en esperanta lingvo, do pere de literoj leĝblaj de mi.

En Shangaŭ ni havis la plezuron esti akceptitaj de impona grupo... sepdek samideanoj plejparte gejunuloj. Ĥoro de gejunuloj kantis, ili lernis speciale kantojn esperantlingvajn honore al la alveno de eksterlandaj esperantistoj. E^o-Asocio Ĉina regalis nin per kuketoj kaj fruktosuko. Post unu Ĥoro kaj duono ni adiaŭis amike. Grupo de hispanaj samideanoj estis akceptita post ni... malĝeliĉe neniu kontakto okazis inter niaj du grupoj.

Lasta etapo alproksimiĝis: Hongkong... Kia urbo! Kia ŝanĝo! Fakte la urbo konsistas el du urboj... la internacia, moderna, financa... kaj la malnova. Pri la unua oni tuj elvokas New-York... La dua estas certe multe pli malriĉa.

Ĉio havas finon... do ankaŭ mia skribaĝo Tamen dum longa tempo ankoraŭ mi certe memoros pri la eksterordinara vojaĝo...

Berthe GRAMPP

MOZO INDAS JA... ALMENAŬ RALION! ★

Okazis, kiel anoncote en "LA INFORMILO n^o 54", je la 7a de septembro en "Les Cotes de Meuse" kaj tute sukcesis...

LA UNUA ESPERANTO-RALIO

...organizita de la "Groupe des Espérantistes Meusiens" / Grupo de la Esperantistoj Mozajj /.

Dekduo da aŭtomobiloj el diversaj departementoj lorenaj sekvis aŭ preterveturis unu la alian por atingi kiel eble plej rapide (sed ĉiam tre agrable!) la proksiman el ses etapoj, kiujn la skipoj malkovris helpe de malgrandaj slipoj entenantaj ĉu enigmon, ĉu demandaron, ĉu humuran ekstravagancon, laŭ bondeziro en Esperanto aŭ en la franca.

Ĉiuj partoprenantoj -juneguloj kiel malpli junaj- iris do aŭtomobile kaj kelkfoje piede, por pli bone ĝui la ĉirkaŭaĵon, de mirinda belvidejo (Hattonchâtel) al gravaj histoririĉaj lokoj (kiel Les Eparges) tra arbaro kaj valetoj florplena.

La plej erudiciaj en historio, geografio, literaturo aŭ artoj povis gajni same kiel la plej observemaj aŭ eĉ la sinhelpemuloj: la ludon gajnis -kompreneble- la plej bona teamo, kiun mi gratulas ĉi-tie, ŝerce aldonante, por parodii la evangelion, ke "la lastaj fariĝis la unuaj" (la partoprenintoj komprenos min!).

Estis poste okazo, interrenkonti aŭ rekontaktiĝi unu kun la aliaj, babilante pri la forpasintaj ferioj, pri la 71a U.K^o en Ĉinio aŭ rendevuante en Nancio por la 24a staĝo de parolata esperanto...

Tre gratulindaj kaj dankindaj pro la plezuriga tago estas ĉiuj organizintoj, kiuj eĉ povis havigi al ni mildan veteron dum la tuta tago kaj varmetajn sunradiojn dum la pikniko en Saint-Maurice-sous-les-Cotes.

Ĉiu leganto deziru al la G.E.M. por la 2a ralio multajn, ankoraŭ pli multajn partoprenantojn eĉ el la najbaraj regionoj, franclingvaj aŭ ne: Esperanto ne estiĝis por samlingvanoj!

Hervé MOUGIN

Sinjoro Marcel CUENE, iama Prezidanto de nia Federacio, forpasis fine de julio. Al lia familio ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn.

LA RESPONDECULOJ DE LA ESPERANTO-JUNULARO KUNVENIS EN RASTATT

En la Dioceza Domo Sankta Bernardo en RASTATT kunvenis por du tagoj la estraro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (T.E.J.O.). La estraranoj el Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hispanio kaj FR-Germanio faris sian estrarlaboron kaj renkontiĝis kun esperantistoj el Rastatt kaj ĉirkaŭaĵo. Laŭ informo de la unua vicprezidanto, S-in^o D-r^o Marie VANCUROVA, ili konferencis antaŭ ĉio pri la preparo sur la vasta mondo por la 100-jara jubileo de Esperanto. Pri ĝisnuna preparlaboro por la UNIVERSALA KONGRESO en VARSOVIO, Pollando, en la jubilea jaro 1987, raportis la ĝenerala sekretario Jan KOSZMALUK.

TEJO arigas junajn esperantistojn el pli ol 50 nacioj en ĉiuj kontinentoj kaj kunordigas la laboron de naciaj junularaj asocioj.

Temo de la konferenco en Rastatt estis ankaŭ la analizo de la ĵus finiĝinta seminario de TEJO en la eŭropa junulara centro, institucio de la Eŭropa Konsilio en STRASBURGO. Tiu seminario, en kiu partoprenis junuloj el diversaj orientaj kaj okcidentaj landoj eŭropaj, pritraktis la temon "Interkultura interkompreniĝo kaj internacia kulturo", al kiu kontribuis ankaŭ referento el Japanio. Per diskutado estis analizata la grava rolo de Esperanto por prosperigi la interkulturan interŝanĝon.


La prezidanto de la Germana Esperanto-junularo (GEJ), ThomasBORMANN, kaptis la okazon por danki al TEJO-estraro pro la aparta atento, kiun ili direktas al la multspecaj aktivaĵoj kaj en Federacia Respubliko Germanio kaj en Baden-Virtemburgo.

Elisabeth SCHWARZER

★★★★ plus rapide... plus efficace ...



NOTRE NOUVEAU COURS D'ESPERANTO PAR CORRESPONDANCE



- ★ un matériel MODERNE
- ★ une technique EPROUVEE
- ★ un réseau d'animateurs COMPETENTS
- ★ un savoir IMMEDIATEMENT opérationnel

C'EST LE COURS "QUATRE ÉTOILES"!

Tous renseignements à l'adresse suivante:

COURS D'ESPERANTO M.J.C. Ph. Desforges
PAR CORRESPONDANCE 27, Rue de la République
54000 NANCY

novaĵoj el nia libro-servo



Pro provizoraj teknikaj kialoj, nia libro-katalogo ne povas aperi en ĉi-tiu n^o de LA INFORMILO.
Ĝin vi malkovros en la n^o 56 (decembro)


Jen la nove disponeblaj libroj

= Ĉu rakonti novele? (Valano)	55,00 F
= Geologio internacia	25,00 F
= Diskriminacio	59,00 F
= Amuza matematiko por gelernantoj	28,00 F
= Matematika vortaro	58,00 F
= Germana antologio	92,00 F

Afiŝoj por nia perkoresponda kurso estas ankoraŭ disponeblaj. Petu ilin ĉe J.-P. COLNOT, 15 Rue de Lavaux, 54520 LAXOU



distra angelo



HORIZONTALA

1 naĝobirdo en la marĉo - ofta dum aŭtuno (R). 2 prepozicio - kvincent folioj - simbolo de moleco. 3 ĝi karakterizas religionon - per la buŝo kiel vento (R) - plurala finaĵo. 4 ĉiutaga kajero (R) - malvarma - adverbo. 5 ujeto (R) - malpuraĵo - juvelŝtono (R). 6 inter du maroj (R) - flarilo (R) - por rigidigi tolaĵon. 7 anelido (R) - pronomo - konjunkcio - iamaniere kuiri. 8 blovinstrumento (R) - direktas. 9 riproĉinda (R) - vazo (R) - natura armilo. 10 multnombra kolekto - nervo (R) - sufikso. 11 la tuto - krustulo (R) - lepidoptero. 12 verda loko (R) - prefikso - simbolo de malmoleco - necesajo (R).

VERTIKALE

1 en la ungoj - malbelaspekta manĝaĵo. 2 produkti (R) - protekti kontraŭ riskoj. 3 kapitano (R) - kora donaco (R). 4 turnebla fermilo (R) - azia popolo (R) - en ŝakludo (R). 5 parto de insulo (R) - meti en ies posedon - patato (R). 6 apenaŭ aŭdebla - papilionaco (R) - prefikso. 7 sieno - mara herbo. 8 cefalopodo (R) - akuta (R) - el ĝi eliras la vereco (R). 9 metalo - malpliigi la vibradon - larforma birdo. 10 ankoraŭ ne spertita - dalio (R). 11 el la nova mondo - iamaniere kanti (R). 12 jelpi (R) - sejna flankrivero - antaŭe ne ekzistanta.

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du "punktitaj" komumoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ac ag alo an ar ĉo dis do ede eo eo er es fo io ip kr la li lo lo mo na ni no no
no no op op pi po pro ra ri rio ris ro si sko to tor ute ve vio

1	beletra rakonteto
2	neatingebla paradizo
3	subtera ĉambro
4	severa admono
5	literatura verko
6	uzi laŭplaĉe
7	organo de mamulino
8	metalhoketo
9	famekonata vilaĝo
10	malhonora kolono
11	teksisto
12	repago al kliento
13	trupmovo
14	trinkaĵo
15	juvelŝtono
16	viskoza likvaĵo

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ

KRUCVORT-ENIGMO:

lombardistoj iperit emocia tolu rukul id ork
el ĉantaĝ tegol naŭno iuj agio trejn noval
ar koko oaz aiz amara al ont defili limet
enoterm naiveco lurdo ondadi jelpi

SILAB-ENIGMO:

por la amanto ĉio estas aminda en la amato.

imprimé par l'AGENCE TECHNIQUE DES ASSOCIATIONS, 12, Rue
Voltaire, 55000 - BAR-le-DUC = le Directeur de la publi-
cation: Jean-Paul COLNOT = le Rédacteur: Pol DENIS = Inscription à la CPPAP sous le n° 62 887

Michel GOULLET (52 St-Dizier),
simpatianto, sendis al ni poemon okaze de la
"Jaro de la Paco"...

Estu PACO! Oui.. Da? Si... Jes: Que la PAIX soit!
C'est l'année de la PAIX?... Déjà, on l'aperçoit...
Hello? En nous d'abord, puis entre nous, réelle,
O! Nous l'adapterons au monde, Universelle!

Démolissons le mythe absolu des nations,
Erigeons sagement d'autres Fédérations!

L' ESPERANTO vivant, épris de tolérance,

Et l'Arc-en-ciel, couleurs diaprées de l'Espérance,
Seront les stimulants de cet Age nouveau,
Propulsé par l'élan des citoyens du Monde
Egayés tout autour de notre mappemonde!
Rénovée sans détour, et au plus haut niveau,
Alors l'Economie devient Distributive,
Naturelle Abondance et mine d'Or active...

Tablons vers ces atours: Mondial est l'Avenir!
Ovationnons dès lors ces beaux jours à venir...

Bientôt, tous les humains, à l'âme noble, ouverte,
Initiés au bonheur, vigilants et hardis,
Ensemble édifieront sut Terre un Paradis!
Nous communiquerons grâce à l'Etoile Verte,
Traçant la voie à l'Art et à la Découverte!
O! Corne d'Abondance, enrichis-nous bientôt...
Tu es, bel Arc-en-ciel, clef de l'ESPERANTO!